# ELNA-BULTENO

ESPERANTO INTERNACIA LINGVO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 13(72) Marto 1972

ARTHUR E. REGAL MORTIS

Julie Regal informis nin pri la morto de sia kara patro, Arthur E. Regal, la 8an de februaro, je la aĝo de 87 jaroj,en Donner's Grove, Ill. Li komencis lerni Esperanton en 1930, kaj de post tiu tempo li restis fervora samideano. Belajn tradukojn de anglaj poemoj li faris, kaj dum kelkaj jaroj li instruis la internacian lingvon. La movado perdis amikon.

ANNE WHITTEKER PETAS HELPON

Anne Whitteker, 20 S.W. Mitchell, Portland, Or. 97201, anino de la Ekskurso-Komitato por la 57a Universala Kongreso de Esperanto en Portlando, la 29an de julio ĝis la 5a de aŭgusto, 1972, serĉas personojn, kiuj povos esti gvidantoj por la diversaj ekskursoj planataj. Kvankam S-ro Ken Ver Ploeg prizorgas la aferon de helpantoj ekster Portlando, li konsentas, ke gvidontoj kontaktu Anne Whitteker rekte, ĉar ŝi bezonas pli da personoj.

SERGIO DOCAL INSTRUOS KANTE

Ne por doni plezuron al la aŭskultontoj, sed nur por ebligi al ili la lernadon de melodioj kaj lokigon de la vortoj sur notoj, faris S-ro Sergio Docal, 5021-25th Pl. N., Arlington, Virginia 22207, longegon sonbendon. Li kantis kaj akompanis sin ĉe la piano je proksimume 150 kantoj en Esperanto. Se vi dezirus lerni la kantojn, ĝi ne kostos, ĉar kiu ajn petos kopion, li nur pagos la koston de la blanka (aŭ malplena) sonbendo, kaj, se la programo ne plaĉus al li, li povas forviŝi ĝin por uzi la sonbendon alimaniere. S-ro Docal preferas fari kopiojn sur 7" bobeno kun 1800 futoj da bendo kaj 4 monofonaj trakoj, ĉar tiel li povas kopii du trakojn samtempe (la tuta programo postulas preskaŭ 6 horojn!). La mendonto pagos la poŝtkoston, kaj S-ro Docal esperas, ke ĉiuj faros kopiojn por amikoj, prepare al la UK.

S-INO ROBERT C. WILLS VARBAS EN OHIO

S-ino Robert C. Wills, 94 West Riverglen Dr., Worthington, Ohio 43085, ankoraŭ faras laboron por Esperanto: Oni priskribis ŝian radio-kurson kaj priparolis ŝian studanton, fraŭlo Chris Littler, en la "Worthington News," ĵaŭdon, la 9an de decembro. Poste aperis en la "Chillicothe Ohio Gazette," lundon, la 3an de januaro, 1972, informa artikolo pri ŝia parolado tie ĉe loka kunveno. Alia artikolo pri la sama okazo aperis en la "Spectater," la 12an de januaro. Kaj pligranda artikolo, inkluzivante kvanton da ŝiaj plej utilaj ideoj, aperis en la "Worthington News" la 13an de januaro. Preskaŭ ĉiu numero de la eldonaĵo "On Campus," de la Ŝtata Universitato de Ohio, (ŝajnas al ni) mencias ŝin kaj la movadon.

WALTER DONNER SENDIS PLI OL 50 VORTLISTOJN

La anonco en ELNA-Bulteno, numero 12(72), pri vortlisto, kiu enhavas 963 vortojn, kiun oni ricevos senkoste kontraŭ donaco de $0.40 en poŝtmarkoj, havis sukcesan rezulton. S-ro Donner, 17308 Mapleboro Rd., Maple Heights, Ohio 44137, anoncis, ke li jam sendis pli ol 52 kopiojn al la petintoj, kaj li ankoraŭ havas proksimume 40 ekzemplerojn por plenumi la dezirojn de petontoj.

## NI KORESPONDU

Bibliotekisto hungara ŝatus interkonatiĝi kun sperta korespondanto usona, kiu informus lin sisteme pri la kulturaj socialaj rilatoj de usono. Li skribos pri la samaj temoj, kaj interŝanĝos poŝtkartojn kaj ilustritajn ĵurnalojn. Balla Gyula, Debrecen Egeszsegügyi Cyermekotthon, Böszörmenyi, u. 148 sz., Hungara Popola Respubliko(Hungary.)

21jara lernanto en Industria Pedagogo-teknistlernejo interesiĝas pri la turismo, radiotekniko, ktp., kaj serĉas geamikojn en usono. Marek Zurek, Wroclaw 5, Katowicka 39/4, Pollando (Poland).

26jara studanto pri historio ŝatas sporton kaj muzikon. Li estas filatelisto kaj kolektas pri la temoj: pentro, sporto, floro, ktp. S-ro Ivan Panaiotov, Str. Panaiot Angelov 4, Veliko Tirnovo, Bulgario (Bulgaria).

Japana mondveturistino, kiu loĝas en Oslo kaj studas la norvegan lingvon, intencas rondvojaĝi nordan kaj mezan amerikon inter junio kaj aŭgusto, kaj ŝi ĝojos viziti vin, prelegi esperante, helpi pri kursoj, ktp. F-ino Tamiko Kauakami, ĉe Per Bang, Torsgt. 1, I Oslo 2, Norvegujo (Norway).

Japana kursgvidanto serĉas korespondantojn por tri studantoj el sia klaso: Li estas S-ro Masamoto Nario, Minami-ku, Kissyoin Hattanda-tyo, Zyuzyo-Koodan 8-3, 601 Kioto, Japanio. La unua studantino estas oficistino, kiu interesiĝas en la "pensmaniero de virinoj" en usono. Miyaoka Hiroko, Japan Kyotoku Otakunigun, Nagaoka-cyo, Tamooka note-28, Lyokuin Gyutaku-405, Japanio. Alia estas 27jara oficisto en komerca enterpreso, kiu interesas pri politiko, ekonomio, ktp. S-ro Tachiki Sadaaki, Higasiyama-ku, Honmachi 10-chome 140, 605 Kioto, Japanio. La tria estas 33jara s-ino, kiu amas la muzikon kaj romanojn kaj havas intereson pri la t. n. "virina liberigo." S-ino Itou Kazue, Yamashina Nishinoyama, Nakatorii-iko 135-16, Kioto, Higashiyama-ku, Japanio (Japan).

14jara studanto en mezgrada lernejo en itala urbo de 60 miloj da enloĝantoj volas interŝanĝi leterojn kaj poŝtkartojn. Mauro Renzetti, Via Saturnia 40, 58100, Grosseto, Italujo (Italy).

Vidvino mezaĝa, instruistino en matematika fako, dezirus interkonatiĝi kun samaĝa esperantisto (vidvo),"por forigi la solecon de la alproksimiĝanta maljuneco." Ŝi interesiĝas en ĉio, kio plibonigas kaj riĉigas la vivon. Maria Vitalyos , Str. Gării nr. 11, Tîrgu-Secuiesc, jud. Covasna, Romanio.

17jara studantino en gimnazio, kiu lernas ankaŭ francan, rusan, kaj latinan lingvojn, deziras korespondi. Barbara Paszek, os. Grunwaldzkie 10/11, Mikokow. K/Katowic, Pollando (Poland).

27jara teknikisto-specialisto pri la motoroj kun interna brulo korespondos pri ĉiuj temoj. Ĵeĉko Dobrev, Str. ul. Vastanie 169, ur. Ŝumen, Bulgario.

Kompatema virino, Florentyna Renatte Dudescu, serĉas sian amikon, Nikolas Roos, kiu foriris el Rumanio marto-monate, 1965, al usono. Pro grava malsano, ŝi ne povis korespondi, sed nun petas Nikolas Roos, kie ajn li estus, aŭ iu alia kiu konas lin, anoncu al ŝi informon. Skribu al:D-rino Florentyna Renatte Dudescu, Poŝtrestanta Covasna, jud. Covasna, Rumanio.

51jara viro, kiu kolektas alumet-etiketojn el ĉiuj landoj, volas korespondi kun usonanoj, kaj interŝanĝi aĵojn. Josef Kozlowski, Gniewkowo, pow. Inowroclaw, Pollando (Poland).

20jara fraŭlino volas korespondi pri muziko, literaturo, filmoj, ktp. F-ino Pepa Vâleva Petrova, v. Cernogorovo, Hasnovski, Bulgario (Bulgaria).

Scivolema viro volas uzi Esperanton en koresponado. H. Bojanowski, Lidzbark K/DZ, Stare Miasto 6, Pollando (Poland).

## ESPERANTO-SKRIBMAŜINOJ

verkita en la angla lingvo de Armin Doneis, 1960
tradukita de Donald Munro, antaŭ li mortis, 1970

Mi ricevis multajn demandojn pri supersignitaj literoj sur ordinaraj skribmaŝinoj, kaj kiel ili povas esti surmetitaj facile kaj malmultekoste. Ĉi tiu respondo eble estos interesa al ĉiuj personoj, kiuj ĵus komencas tajpi Esperanton.

Ĉiu ajn ordinara skribmaŝino povas esti adaptata por Esperanto, ĉu ĝi estas nova aŭ uzita maŝino, kaj la kosto de la ŝanĝo eble ne estus pli ol kvin aŭ dek dolaroj (!!!). La procedo konsistas el anstataŭi la duono-kaj kvarono-simbolojn per la supersignoj ^ kaj ˘. Por fari ĉi tiun anstataŭaĵon, oni mal-lutas la antaŭajn simbolojn kaj anstataŭas ilin per la esperantaj supersignoj, kiujn oni povas havigi ĉe la plimulto de la skribmaŝinaj fabrikantoj. Mi facile akiris ilin por mia Smith-Corona kaj por mia Underwood, kaj la loka skribmaŝina riparisto faris la instalan laboron bone.

Per simpla ŝanĝo de la skribmaŝina klav-mekanismo, de tiuj du klavoj, oni povas fari aranĝon tiel ke kiam oni frapas iun el la supersignitaj klavoj, la ĉareto ne moviĝas unu spacon. Do, por tajpi la literojn ĉĈ, ĝĜ, ĥĤ, ĵĴ, ŝŜ aŭ ŭŬ, oni nur unue tajpas la supersignon ^ aŭ ˘, kaj tiam dum la ĉareto senmove staras en la sama pozicio, oni frapas la taŭgan, deziratan konsonanton. Tiel oni frapas du klavojn por fari supersignitan literon, sed la ĉareto moviĝas nur post oni frapas la klavon por la konsonanto.

Eble ĉi tiu procedo ŝajnas esti komplika, sed mi certigas al vi, ke post oni praktikas ĝin iomete, ĝi iĝas kutimo, kaj oni povas fari ĝin sen peno. Estas preskaŭ tiom facile tajpi ĉĝĥĵŝŭ ol cghjsu, ĉar la supersignoj estas tajpataj de frapoj al la taŭgaj klavoj per la malgranda fingro de la dekstra mano, dum la maldekstra mano tajpas la konsonantojn preskaŭ samtempe. Efektive, estas bezonata multe malpli da tempo por fari ĝin ol por priskribi la proceđon.

Sur miaj skribmaŝinoj la ^ kaj ^ supersignoj estas funkciigataj per klavo de la dua vico, ĉe la ekstrema dekstra fino de la klavaro, kie la malgranda fingro de mia dekstra mano kutime ŝvebas. La ˘ kaj ˘ estas funkciigataj per la klavo rekte super ĝi, en la tria vico. Ĉi tiu pozicio estas facile atingebla per la malgranda fingro.

Per ĉi tiu aranĝo oni povas uzi la supersignojn kune kun iu ajn litero, vokalo, aŭ konsonanto, se la rezulto havus sencon. Do, ĉi tiu aranĝo aŭ diversigaĵo de ĝi, povus esti uzata por tajpi supersignojn ankaŭ por aliaj lingvoj. Ĉi tiun aranĝon mi ne iniciatis, sed ĝi servas tre kontente kaj ekonomie.

## KUGLOJ KAJ VORTOJ

de Ella Gibson

Milithomo fidas
Kuglojn, kaj li pretas
Sian kontraŭulon pafi.
La pacema homo
Taŭgajn vortojn serĉas,
Por la gravan krizon trafi.

Monda stato kreskas
Nur el homnaturo;
Kaj homare ĝi dependas,
Ĉu la kugloj hajlos.
Ĉu la vortoj venkos.
Maltrankvile, ni atendas.

# KIAL TIOM DA ERAROJ ?

de Rodney Ring

Oni rajtas esti neperfekta, sed ELNA-Bulteno "tro-uzas la privilegion," ĉu ne? Konsentinte al la propono, ke ELNA havu amatoran bultenon, sen istaj preparantoj, ni ankoraŭ konsterniĝas pro la malalta nivelo de la lingvoscio sin montrante inter la anoncoj, novaĵoj, kaj artikoloj. Ni ekdemandas al ni mem, "kial tiom da eraroj?"

Ni ne devu senkulpigi nin, sed ekzistas pluraj kialoj, pri kiuj la legantoj, precipe tiuj en aŭ el eksterlando, nenion scias. Ekde la malgravaj ĝis la plej tragikaj kaŭzoj, mi intencas aranĝi vicon ĉikune. Ĝia ne-multamplekso ne signifas ne-farendan aferon, sed signifas nur, ke la eroj sin grupigas en malmultaj kategorioj.

Neprofunda sed vera kaŭzo estas, ke la redaktoroj plurfoje gluis paperstriojn mal-larĝajn sur la tekston malĝustan, tute kovrante kaj korektigante la erarojn, kaj poste malĝoje lernis, ke la strioj sin liberigis antaŭ la presisto fotis la paĝon.

Kompreneble ankaŭ, kunlaborantoj de ELNA-Bulteno konfesas, ke ili senzorge legis sendaĵojn, senatente kunmetis anoncojn, kaj eĉ tajpis la materialaĵojn en distrata maniero.

Ne ricevinte bezonatajn informojn por enda eldonaĵo, kies limdato estas preskaŭ preterpasata, ni hastis, kaj ne nur permesis erarojn pro la freneza fin-momenta tajpado, sed vere pro aktuala manko de prespretiga laboro. Jes, okazis, ke bulteneroj enhavis ne-redaktitaĵojn. Ni bedaŭras ĝin, sed almenaŭ ĝi reflektas la uzon inter la anoj en usono.

Plue, ni apenaŭ komencis la taskon, kiam mortis nia ĉefredaktoro, Donald Munro, kreinto de la bulten-ideo mem, malantaŭ-lasante la devon al komencantoj kaj tro-okupatuloj, kiuj ekde tiam fuŝis la laboron. Tio estis senintence, sed fakte, pro hazardaj cirkonstancoj, la tiaj laboraĉoj estis ne-eviteblaj. Ĉu la sorto estas kontraŭ-ulo?

Preterpasante la bonekonatan fakton, ke kutime ĉie la volontaj kontribuantoj malsukcesas lerni la lingvon, dum lingvospertuloj malofte kontribuas ion ajn, krom tio, ni turnu nin al alia situacio: ELNA-Bulteno havas multajn verkistojn, kaj la amasiĝo kaj miksaĵo da diversaj verkstiloj povas esti agaca. Ekzemple, la verko de iu aglutinema redaktoro, kiu amegas malsimplajn multoblajn vortkuniĝojn, kaŭzis ĉiam reakciojn. Ni konstatis almenaŭ, ke li konscie faras ĝin, kredante, ke tio estas la plej forta aspekto de la lingvo, konvinkinte, ke tia uzo havas belecon. Aliaj aŭtoroj havas la emon uzi strangajn esprimojn, kaj ili insistas, ke tiuj estu permesataj, escepte se, kiam kontraŭ unu de la 16-reguloj, ni nomigas ilin "malĝustaj."

Enmigrantoj, eksterlandanoj, kaj ĉiuj, kiuj ne lernis la anglan lingvon en la usona maniero, per la metodo kaj sub la influo de John Dewey, ne povas kompreni kia malpuriga forto tio estas! Ni vivas en usono kvazaŭ ne ekzistas gramatiko. Mi trovis 35 erarojn sur la unua paĝo de la tagĵurnalo en mia urbeto, kaj ne skribis leteron pri tio, ĉar neniu ekscitiĝas pri tia ĉiutaga okazo. Ni pensas: lingvoj estas nur interkomprenilo; ne gravas la ĝusteco. Ju pli vi ne konsentas, des pli vi ne estas usonano.

Nia ĉirkaŭaĵo substrekas nek sciencon nek lingvistikon, sed nur teknologion. Ĉiutaga vivo en usono estas ĉirkaŭata de abomenindaj erarplenaj frazoj elvenante el radio, televido, libroj, ktp. Sekve, ni estas tuŝitaj.

Kelkaj legantoj pensas, ke ni devu ne pardoni la erarojn, ĉar la lingvo de oficiala publikaĵo estu senriproĉa. Eble ili pravas. Intertempe, tamen, ni havu bonvole paciencon, anstataŭ kolero aŭ moko.

# PROPONATAJ ALDONOJ AL LA PLENA VORTARO

de Joseph Conroy

Ekde mi unue lernis ĉi tiun lingvon, ĉiam mirante la radiksistemon Zamenhofan, mi iame trovis novajn vortojn, kiuj konfuzis min. Ilin distranĉante laŭ la reguloj, mi ankoraŭ ne povas ilin kompreni - aŭ, pli bone : la senco, kiun mi eltrovis, ne troviĝis en la vortaroj. Do, mi decidis kunmeti liston da tiaj vortoj por tiam, kiam mi povus priparoli tiun malagrablan situacion kun iu saĝa akademiano. Ĝis nun tiu tago ne alvenis; do, jen por vi eta elĉerpo de mia iome longa listo:

amaso - unupunkta ludkarto en la sekvantaro de karo
amara - kio ajn apartenas al grupo da amantoj
amforo - Kiam la amo ne plu ĉeestas; manko de amo
amputo - profunda truo, plej ofte en la tero, kie kelkaj specoj de indiĝenoj kutimas sekse intermiksi
amuzo - uzi precipe por amrilatoj
dioksido - kombinaĵo de iu dio kaj oksigeno, ekz., kiam multdiuloj bruligas lignan figuraĵon de unu el siaj dioj
eksciti - citi ion, kio ne plu valoras la penon
inciti - citi virinan babilaĉon
inaŭguro - diveno pri estonteco, bazita sur aktiveco de virinoj
indiko - la dikeco de iu virino
inokuli - zorge rigardi virinojn
insidi - sidi kiel virino
insigno - speciala signo uzata de la Ligo por Virina Libereco
Sindiko - la dikeco de si mem, ekz., "lia sindiko pli ampleksiĝas."
Sinodo - odo verkita pri si mem

---

Jen fidelaj personoj kiuj donacis al la UK-fonduso dum la pasintaj monatoj: Laŭ Ŝtatoj, Ca., Anoj de la Esperanto-Klubo de Napa; Fla., A.M. Brya; N.Y., H. B. Ellis, F. H. McMann, Mark Starr; Ore., N. J. Campbell, Jim Deer; Oh., Ges-roj R. L. Wills; Pa., W.P. Simpson, S.V. Steinberg; Wa., K. Ver Ploeg, kaj Ges-roj Paul Eddy. (Sendu al: P. Linker, 1414 Monroe, Walla Walla, Wa.) Aldonoj al la listo estas: Ges-roj J. N. Gibson, Leroy Edwards, Ray Nevi, Emma Jungton, Jack K. Lesh, kaj Roan O. Stone.

---

BONVOLU ELTRANĈI LA SUBAN PARTON KAJ SENDI ĜIN, KUN MONO, AL LA KASISTINO

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

ELNA 197__

**Mi enmetas la kotizon kiel subindikitan. Mia nomo kaj adreso ĝuste aperas sur la alia flanko (dorsflanke).**

KONTRIBUANTA MEMBRECO

___KONSTANTA ($8.00)
___EDZIĜPARA ($12.00)
___SUBTENA ($15.00)
___PATRONA ($25.00)
___DUMVIVA ($160.00)

**Mi elektas la jenan senpagan gazeton:**
___Kontakto
___Oomoto
___Heroldo (nur novaj abonantoj)

____KUNDONACO

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

___STUDANTO ($3.00), plentempa kaj malpli ol 30-jaraĝa _____NASKIĜJARO
___EKSIĜULO ($4.00), pli ol 62-jara post kvinjarabono.

NOVA ABONO_____

_____ABONRENOVIGO

S-ino Doroteo Holland anoncis, por la Ekzamena Servo, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, Ca. 93111, ke la jenaj personoj sukcesis pri la oficialaj ekzamenoj : (kun honoro *)

KOMENCGRADA EKZAMENO:

S-ino Audrey Janisen, San Fran., Ca.
S-ino Melody Reynolds, Alameda, ''
*S-ino Dorothy Lange, Stockton, ''
S-ro Michael Horn, San Jose, ''
*S-ro Edmond Reynolds, Alameda, ''
S-ino Jean Miller Wood, Mill Valley.
*S-ro George Neumann, Chicago, Ill.
S-ro Paul A. Graham, '' ''
S-ro Peter Anderson, '' ''
S-ino Betty Phelps, Peru, Ind.
*S-ro Carlos de Jesus, Raynam, Mass.
*S-ro Dennis Murphy, APO, New York.
S-ino Barbara Ann Sarr, Columbus, Oh.
*S-ino Louise McFerren, '' ''
F-ino Elaine Hutzelman, Circleville.
*S-ino Dorothy Jones, Portland, Or.
S-ro Larry McLaughlin, '' ''
F-ino Blanche Graf, Freewater, ''
S-ino P. Schneider, San Antonio, Te.
*D-ro D. M. Keedy, '' '' ''
*S-ino E.M. Eddy, Olympia, Wa.
D-ro Q. Schwenke, Walla Walla, Wa.
S-ino R. Laughlin, '' '' ''
F-ino L. Phillips, '' '' ''
S-ino J. Schwenke, '' '' ''
S-ro Dan E. Wood, '' '' ''
S-ro J. McMinds, Aberdeen, ''
*S-ino M. Hughes, '' ''
*S-ino J. Hansen, Olympia, ''
S-ino E. Kramer, '' ''

MEZGRADA EKZAMENO :

*F-ino M. Barkley, San Fran., Ca.
S-ro John Fulton, Rosemead, ''
S-ro D. Murphy, Newport Beach,''
S-ro G. Carlton, Sacramento, ''
*S-ro Carlos de Jesus, Raynham, Ma.
S-ro Kevin Carmody, Hanover, N.H.
S-ro Allan Fineberg, Patterson, N.J.
S-ro Joseph Gamble, Salem, Or.
S-ro George Roberts, Salem, Or.
S-ro S. Teeples, San Antonio, Te.
S-ro A. G. Pearson, Austin, ''
S-ro L. Tutt, Universal City, ''
S-ino Sara Estling, Walla Walla, Wa.
*S-ro Albert Estling, '' '' ''
S-ino Peggy Linker, '' '' ''
*S-ro R. Swenson, Janesville, Wis.

PREZIDANTO
Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal.
92037

VICPREZIDANTO
Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City
New York, 11104

SEKRETARIO
Robert E. Bailey
147 Birch Street
Redwood City, Ca.
94026

KASISTINO
Peggy Linker
1414 Monroe St.
Walla Walla, Wash.
99362

KORESPOND-DIREKTORINO
Ellen A. Lewis
15 Salisbury Rd.
Brookline, Mass.
02146

UEA-ĈEFDELEGITO
Armin Doneis
P.O. Box 105
Pharr, Texas
78577

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
Information Center, Rm. 821
156 FIFTH AVENUE
NEW YORK, N. Y. 10010

RETURN POSTAGE GUARANTEED
ADDRESS CORRECTION REQUESTED

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
Paid
Kutztown, Pa.
Permit No. 8